

VIRTUALAJ RENKONTOJ, PASINTAJ KAJ VENONTAJ

Kiel anoncote, la Zamenhof-Tago 2020 en Madrido devis okazi virtuale. Ĝi disvolviĝis dum la mateno de la sabato 12a de decembro, per la servo Jitsi. Post mallonga saluto de la prezidanto de MEL, Félix Jiménez Lobo, okazis du prelegoj. Unue Pedro Hernández prelegis pri la funebraj ritoj en malnova Egipto, kaj poste Félix prelegis pri la Esperanto-kursoj en la universitato UNED. La kunveno finiĝis per komuna virtuala tosto.



La regula unuasabata renkontiĝo okazos ĉimonate la unuan sabaton, pro la festoj, sed la duan, kaj denove ĝi devos esti organizata virtuale. Notu do la informojn: la 8an de januaro, je la 6a vespere, pere de la adreso <https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto>.

Se vi neniam ĉeestis, ni memorigas ke la proceduro estas ja tre facila. Oni povas klaki la supre menciitan adreson en ajna navigilo aŭ rekte uzi programon Jitsi en komputilo aŭ telefono kaj aliri la renkontiĝejon "MadridaSabataRenkonto" aŭ. La babilejo estas malferma por iu ajn esperantisto, komencanto aŭ progresinto, madridano aŭ loĝanto en alia loko.

ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La Ordinara Ĝenerala Kunveno de statuto de Madrida Esperanto-Liceo okazos la 1an de februaro 2021, je la 18:30. Jen la kunvoko, nur por anoj de la asocio:

La prezidanto alvokas ĉiujn membrojn por la ordinara ĝenerala kunsido okazonta la lundon 1an de februaro 2021 je la 18:00 (unua alvoko) kaj je la 18:30 (dua alvoko) en la sidejo de la asocio, str. Rodríguez San Pedro 13, 3-7 de Madrido. Ĉar ni ankoraŭ suferas pandemion, se vi planas ĉeesti persone, nepre antaŭanoncu vin, ĉar ni ne devas ĉeesti amase. Por la nesurlokaj ĉeestantoj, anoncu vian intencon partopreni kaj ni sendos ligilon al Jit-si reta salono.

Oni pritraktos la sekvajn aferojn:

1. Raporto pri evoluo de la membraro
2. Diskuto kaj eventuala aprobo de la financa raporto 2020
3. Diskuto kaj eventuala aprobo de la buĝeto por 2021 kaj jarkotizo
4. Diskuto kaj eventuala aprobo de la agad-raporto 2020

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

5. Diskuto kaj eventuala aprobo de la agad-programo por 2021
6. Demandoj, petoj, proponoj
7. Redaktado, laŭtleĝo kaj eventuala aprobo de la protokolo de la kunsido.

Se vi ne povos ĉeesti, memoru ke vi povas transdoni vian voĉdon-raĵton al alia ĉeestonta membro, pere de mesaĝo al: madrid@esperanto.es.

GRAVE: Oni povas aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo plenigante la aliĝilon kiu troviĝas en la fako "Dokumentoj" de la retejo de MEL: <http://esperanto.es/mel/index.php/dokumentoj-documentos>. La kotizo nun restas la sama, 12 eŭroj jare.

RETLISTO DE MADRIDAJ ESPERANTISTOJ

Kiel anoncote, jam fermiĝis la servo de retlistoj de Yahoo kaj do, MEL malfermis novan retliston por madridaj esperantistoj ĉe Guglo-grupoj. Vi povas ricevi la mesaĝojn ĉu per via retpoŝto ĉu en la retejo https://groups.google.com/g/esperanto_madrیده. Ĉiu ajn esperantisto, ne nur madrida, povas aliĝi al ĝi vizitante tiun adreson, aŭ sendante mesaĝon al la adreso: esperanto_madrیده+subscribe@googlegroups.com.

PARTOPRENU EN LA BELARTAJ KONKURSOJ 2021

Anonciĝis jam la kunvoko de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 2021. Kiel kutime, la branĉoj estas poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj infanlibro, kun la antaŭnelonge kreitaj subbranĉoj "Mikronovelo" kaj "Monologo aŭ skeĉo".

Ĉijare UEA enkondukas novan branĉon, nomatan *Kantoteksto*, kun la celo provizi E-kantistojn per bonaj kantotekstoj por iliaj repertuaroj. La unu-sola premio en tiu ĉi branĉo konsistas en muzikigo de la premiita teksto kaj prezento de la rezulta kanto fare de kantisto aŭ grupo.

La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. La limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2021.



Pliaj informoj pri la kunvoko troviĝas en la retejo de UEA ĉe: <https://uea.org/gk/915a1>. Detala regularo, ĉe la ĝenerala adreso: [https://uea.org/teko/regularoj/belartaj konkursoj](https://uea.org/teko/regularoj/belartaj_konkursoj).

POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo provizore plu malfermiĝas dum la lundaj vesperoj, sed memoru ke kunvenoj estis nuligitaj kaj ni daŭre petas ke vi anoncu vin kaj vi prenu la normalajn antaŭzorgojn

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la novan retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madrیده.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com